der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde im Kulturbund der DDR

15. Jahrgang Nr. 95 (3/1979) 30 Pf

Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE)

La 14an de marto 1979 en Moskvo en la Domo de amikeco kun eksterlandaj popoloj ĉe aktiva helpo de Unuiĝo de sovetiaj societoj de amikeco kaj kulturaj ligoj kun eksterlando (SSOD), Tutsovetia Centra Konsilio de Sindikatoj (VCSPS) kaj Centra Komitato de Tutsovetia Leninisma Komunista Unuiĝo de Junularo (VLKSM) okazis la Tutsovetia fonda konferenco de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE). La konferencon partoprenis delegitoj de Esperanto-kluboj kaj Esperanto-organizaĵoj de urboj, regionoj, teritorioj, aŭtonomaj kaj uniaj respublikoj kaj ankaŭ reprezentantoj de kelkaj sindikataj kaj junularaj organizaĵoj, de amikecsocietoj.

La konferenco konfirmis la Regularon de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj, elektis ĝiajn gvidorganojn — la Estraron kaj prezidiumon de la Asocio.

Estis elektitaj la prezidanto de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj prof. d-ro -Mahomet Isajev, vice-

Verband Sowjetischer Esperantisten (ASE)

Am 14. Mai 1979 fand im Haus der Freundschaft mit ausländischen Völkern in Moskau, mit aktiver Hilfe der Union Sowjetischer Gesellschaften für Freundschaft und kulturelle Beziehungen mit dem Ausland (SSOD), des Sowjetischen Zentralrates der Gewerkschaften (VCSPS) und des Zentralkomitees des Komsomol (VLKSM) die gesamtsowjetische Gründungskonferenz des Verbandes Sowjetischer Esperantisten (ASE) statt. An der Konferenz nahmen Delegierte der Esperanto-Klubs und von Esperantoorganisationen aus Städten, Regionen, Gebieten, autonomen und Unionsrepubliken sowie Repräsentanten einiger Gewerkschafts- und Jugendorganisationen und Freundschaftsgesellschaften teil.

Die Konferenz bestätigte die Satzung des Verbandes und wählte als Leitungsgremien den Vorstand und das Präsidium des Verbandes.

Zum Präsidenten des Verbandes der Sowjetischen Esperantisten wurde *Prof. Dr. Mahomet Isajev* gewählt.

prezidantoj *Zubkov N. B., Makovskij A. I., Podkaminer S. N., Samodâj V. V.,* respondeca sekretario *Berjoza A. V.*

La partoprenintoj de la konferenco unuanime decidis konsideri la ĉefajn taskojn de la Asocio kaj de la enirantaj ĝin organizaĵoj la partoprenon, uzante Esperanton, en la firmigo de paco kaj disvolvado de la kulturaj ligoj de la sovetia popolo kun la popoloj de aliaj landoj en la interesoj de firma paco, sekureco kaj kunlaborado; helpadon al esperantistoj en lernado de Esperanto kaj profundigo de ĝia scio; edukon de la sovetiaj esperantistoj en la spirito de patriotismo kaj internaciismo, malkompromisemo koncerne la reakcian ideologion, faŝismon, koloniismon, rasan diskriminadon kaj socian maljuston.

La konferenco esprimis certon, ke la Asocio kontribuados disvolvadon de la internaciaj ligoj de sovetiaj esperantistoj kaj koordinos la aktivadon de la lokaj Esperanto-grupoj en la interna kaj ekstera sferoj.

Prezidiumo de Asocio de sovetiaj esperantistoj

Vicepräsidenten wurden *N. B. Zubkov, Prof. S. N. Podkaminer, A. I. Makovskij, V. V. Samodaj.* Sekretär des Verbandes ist *A. V. Berjoza.*

Die Teilnehmer der Konferenz beschlossen einmütig, daß es die Hauptaufgabe des Verbandes und seiner Teile ist, Esperanto für die Stärkung des Friedens und für die Entwicklung der kulturellen Beziehungen des Sowjetvolkes mit den Völkern anderer Länder im Interesse des Friedens, der Sicherheit und Zusammenarbeit zu nutzen, Esperantisten beim Studium des Esperanto und der Vertiefung ihrer Kenntnisse zu helfen und die sowjetischen Esperantisten im Geiste des Patriotismus und Internationalismus, der Kompromißlosigkeit gegenüber reaktionärer Ideologie, gegen Faschismus, Kolonialismus, Rassendiskriminierung und sozialer Ungerechtigkeit zu erziehen.

Die Konferenz gab der Gewißheit Ausdruck, daß der Verband zur Entwicklung der internationalen Beziehungen der sowjetischen Esperantisten beitragen und die Aktivitäten der örtlichen Esperanto-Gruppen im Lande sowie im Ausland koordinieren wird.

Präsidium des Verbandes sowjetischer Esperantisten

Pri ASE en gazetoj de USSR

En diversaj gazetoj de USSR aperis sciigoj pri la fondo de ASE, inter alie en „Komsomolskaja Pravda“ de 17. 3. 1979.

Pri Esperanto en „Moscow-News“

En la en 4 lingvoj aperanta revuo „Moscow News“ n-ro 1/1979 (2833) aperis artikolo pri Esperanto de Boris Kolker, lektoro pri interlingvistiko ĉe la universitato en Ufa.

KONTRAKTO pri amikeco kaj kunlaboro inter

Ĉeha Esperanto-Asocio **Asocio de Esperantistoj en SSR**

kaj

la Esperantistoj organizitaj en Kulturligo de Germana Demokratia Respubliko.

§ 1

Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj Asocio de Esperantistoj en SSR, reprezentitaj per Kunordiga Komitato por Kunlaboro inter ambaŭ asocioj kaj la Esperantistoj organizitaj en Kulturligo de GDR, reprezentitaj per sia Centra Laborrondo Esperanto

- aktive partoprenas konstruadon de la evoluinta socialisma socio en siaj landoj, elirante el similaj kondiĉoj kaj eblecoj,
- akcentas sian volon kaj preparitecon utiligi Esperanton por la socio surbaze de la Fina Akto de Helsinki, kunlabori por firmigo de la paco kaj kunlaboro en Eŭropo kaj en la tuta mondo,
- esprimante sian kontenton pri la profundiĝantaj kaj firmiĝantaj amikeco kaj kunlaboro inter Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko kaj Germana Demokratia Respubliko,
- decidis entrepreni helpe de Esperanto kaj en strikta kunlaboro kun siaj organizitaj membroj de ĉiuj kontraktantaj respublikoj konkretajn paŝojn por plifirmigo kaj pliprofundigo de la amikeco kaj proksimigo de la popoloj de ambaŭ ŝtatoj
- kaj tial subskribas tiun ĉi kontrakton pri amikeco kaj kunlaboro.

§ 2

La kontraktantoj decidis, ke la gvidantaj kaj subordigitaj organoj de iliaj organizoj

- regule interŝanĝos spertojn kaj opiniojn pri la problemoj de la internacia kaj naciaj Esperanto-movadoj kun la celo solvadi komunajn taskojn,
- garantios kaj realigos komunajn taskojn kaj agadojn sur ĉiuj administraj niveloj.

§ 3

La komuna agado inkluzivas i. a.:

- realigon de aktivecoj (ekspozicioj, prelegoj, renkontiĝoj) kiuj plibonigos la reciprokan konon de la rezultoj atingitaj en la konstruado de la socialismo, precipe en la kultura sfero,
- kunlaboron sur la kampo de la esperantista junulara movado,

- plialtigon de la idea nivelo de la membroj, precipe teorian, lingvan kaj fakan preparon de bonkvalitaj instruistoj, lerniloj, teoriaj materialoj pri Esperanto k. a.,
- kunlaboron sur la kampoj de la interlingvistiko kaj esperantologio kun la celo prepari sciencajn materialojn kaj dokumentojn surbaze de la principoj de la marksismo-leninismo,
- la reciprokan popularigon kaj interŝanĝon de la esperantlingvaj publikaĵoj kaj aliaj materialoj eldonitaj en la respektivaj landoj.

§ 4

La kontrakto donas elementan bazon por la kunlaboro inter ĉiuj organizoj, kiuj subskribas tiun ĉi dokumenton. La detaloj estas fiksitaj en la ĉiujaraj plenumaj protokoloj ellaborataj de la estraroj de la respektivaj organizoj ĝis la fino de majo kaj subskribataj fine de septembro por la sekvanta kalendara jaro.

§ 5

Ambaŭ organoj konatigos kaj eksplikos la enhavon de la kontrakto, la manierojn kaj kondiĉojn de ties realigo al siaj subordigitaj komponentoj, por kies reciprokaj kontraktoj pri kunlaboro la enhavo de tiu ĉi estas observenda. La kontrakto kaj ĉiujaraj plenumaj protokoloj estas fiksitaj en agadplanoj de ĉiuj organizoj.

§ 6

La kontrakto kaj ĉiujaraj plenumaj protokoloj estas konsultataj antaŭ la subskribo kun la kompetentaj organoj de la respektivaj landoj, kiuj direktas la organizojn subskribantajn tiun ĉi kontrakton.

§ 7

La kontrakton kaj ĉiujarajn plenumajn protokolojn oni povas ŝanĝi aŭ kompletigi laŭ la deziro de iu ajn partnero, kondiĉe, ke la ceteraj kontraktantoj kun tio konsentos.

§ 8

Tiu ĉi kontrakto kaj ĉiujaraj plenumaj protokoloj estos pretigitaj en Esperanto, la ĉeĥa kaj germana lingvoj. Ĉiuj tekstoj havas la saman validecon. La Esperanta teksto de la kontrakto estos publikigitaj en la informganoj de ambaŭ kontraktantoj.

Por Kunordiga Komitato de ČEA kaj AE SSR:	*Jozefo Vitek, p. m.* *prezidanto*
Por la Esperantistoj organizitaj en Kulturligo de GDR:	*Rudolf Hahlbohm, p. m.* *prezidanto*

Pri la agado de AESSR

La prezidanto de Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko (AESSR), s-ro Milan Zvara, respondis demandojn de „der esperantist“:

1. Bonvolu iom prilumi la ĉefajn celojn de AESSR.

Al ĉi tiu demando plej bone respondas la teksto de la statuto. Taskoj de la Asocio estas disvastigi la internacian lingvon Esperanto kiel ilon por interkompreniĝo, paca kunekzistado kaj ĉiuflanka kunlaboro inter la nacioj, por informi fremdlandanojn pri Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko, ĉefe pri Slovakio, pri kulturaj valoraĵoj de nia popolo, disvastigi bonfamon pri ĈSSR en la mondo, el eksterlando akiradi informojn pri kulturo kaj tiujn konvene eluzadi.

2. Sur kiuj agadkampoj aŭ en kiuj direktoj disvolviĝas la aktivecoj de AESSR?

En la lastaj du jaroj nia ĉefa tasko estas pligrandigi la membrobazon de nia Asocio. Ni povas jam nun diri, ke ni sukcesas. Kompreneble ni devis multe plibonigi la organizan laboron de la Estraro kaj de ĉiuj funkciuloj. La nombro de Esperanto-grupoj konstante kreskas, kaj rilate al loĝantaro en Slovakio nia movado estas sufiĉe forta. Ni jam havas 45 grupojn kaj ni planas ĉi jare fondi ĝovajn 5. Alia interesa fenomeno estas, ke la turisma agado estas parto de nia asocia agado kaj samtempe de niaj organoj kaj grupoj. Tiu ĉi agado aktivigas la intereson pri Esperanto kaj ni facile penetras en junularajn mediojn.

Nia faka laboro koncentriĝas en niaj sekcioj. El ili estas la plej aktivaj la Scienc-Teknika, MEM, la Pedagogia, Junulara sekcioj kaj la Komisiono por scienca esploro. En la jaroj 1980-81 nia ĉefa tasko fariĝos plialtigo de la lingvonivelo de nia membraro, kiu plejparte konsistas el junuloj.

3. AESSR ekzistas 10 jarojn. Bonvolu mencii la ĉefajn kaj plej gravajn atingojn de via Asocio.

Estas komplike resumi niajn atingojn nur per kelkaj frazoj.

Tamen iujn pli gravajn mi mencios.

Komenca amatora organiza laboro en la kadro de nia Asocio jam ŝanĝiĝas, kaj ni komencas almenaŭ parte agi sur profesia organiza nivelo. Ni jam havas du pagitajn oficistojn, kio estas por ni granda progreso kompare kun la pasinteco. En Bratislava funkcias sekretariejo kaj en Proprad Organiza fako kun propra oficejo. Estrarkunvenoj regule okazadas, kaj la taskoj estas precize kontrolataj.

Ni havas bonan superrigardon pri la membraro ne nur de la Asocio, sed ankaŭ de ĉiu Esperanto-grupo. Regionaj komitatoj funkcias, kaj ni laŭplane preparas fondon de novaj Esperanto-grupoj en la lokoj, kiuj estas por ni gravaj.

La transpreno de nia Asocio en la agadsferon de la Ministerio por Kulturo de SSR signifas la plej altan rekonon al la ideo de internacia lingvo Esperanto kaj al la agado de nia Asocio. La Asocio organizas ĉiujare diversajn aranĝojn, el kiuj kelkaj jam fariĝis tradiciaj kaj bone konataj ankaŭ en eksterlando. Ekzemple Somera Esperanto-Lernejo en Košice, Turisma semajno en Slovaka Paradizo, Vintra kaj Printempa renkontiĝoj en Altaj Tatroj. Tiujn ĉi aranĝojn konas ankaŭ esperantistoj el GDR. La eldono de Slovaka Antologio, de la Fina Akto de la konferenco pri sekureco kaj kunlaboro en Eŭropo kaj aliaj publikaĵoj multe helpis al la prestiĝo de nia Asocio en eksterlando.

En novembro 1978 la ĉeĥoslovaka MEM-sekcio subskribis „Interkonsenton pri la principoj de kunlaboro kun Ĉeĥoslovaka Packomitato". Jen estis kelkaj niaj atingoj, neparolante pri nia Televida Kurso kaj pri la Radiokursoj por komencantoj kaj progresintoj. Sed tiuj ĉi aferoj jam estas ĝenerale konataj.

4. Ĉu vi pretas paroli pri iuj interesaj planoj, kiujn AESSR intencas realigi en estonteco?

Mi tuŝos nur unu aferon. Nia Asocio planas aranĝi Esperanto-Domon en la urbo Proprad, kie estos kelkaj klubejoj, administraj ejoj, biblioteko kaj arkivo. Krom tio ĉambroj kun 50 litlokoj por la gastoj ĉu en- aŭ eksterlandaj. Kompreneble ne mankos bufedo kaj manĝejo. La Esperanto-Domo estos lokigita en malnova historia konstruaĵo, kie estos ekstere rekonstruita laŭ malnova aspekto kaj interne laŭ bezono de nia Asocio kaj moderne ekipita. Laŭ ĝisnuna plano la domo estos finrekonstruita en la jaro 1984. Post realigo de tiu ĉi projekto ankaŭ AESSR havos sian kulturhejmon, kiun ni tiel ege bezonas.

5. Kiel vi pritaksas la ĝisnunajn kontaktojn inter slovakaj esperantistoj kaj tiuj el GDR?

Multaj esperantistoj el GDR venas al niaj aranĝoj en Slovakio. Tamen ili venas individue kaj ne organizite. Do en tiu ĉi sfero ni ambaŭflanke povas fari multon. Relative malmultaj slovakaj esperantistoj venas al GDR, kvankam en via lando estas multaj vidindaĵoj.

6. En kio, laŭ vi, konsistas la signifo de la amikec-kontrakto inter la esperantistaj Asocioj de ČSSR kaj Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo?

La amikeckontrakto estas la baza dokumento laŭ kiu ni havos eblecon pli intensive realigadi kunlaboron inter niaj Asocioj kaj niaj membroj. Mi konsideras ĝin ege grava politika kaj kultura dokumento, kiu certe alportos siajn pozitivajn rezultojn.

La redakcio de „der esperantist" tre kore dankas pro la intervjuo.



Pri la agado de ĈEA

La ĝenerala sekretario de Ĉeha Esperanto-Asocio (ĈEA) s-ro Zdenko Křimský respondas demandojn de „der esperantist“:

1. Bonvolu iom prilumi la ĉefajn celojn de Ĉeha Esperanto Asocio.

Nia Asocio, kiel memstara organizo en Ĉeha Socialisma Respubliko respondecas pri la evoluo de la Esperanto-movado en nia lando. ĈEA fondiĝis en jaro 1969. Do tiun ĉi jaron ni festis en aprilo la jubileon de 10jara ekzisto de nia Asocio.

Kiel ĉefaj taskoj estas notitaj en nia Statuto:

- disvastigi la internacian lingvon Esperanto kiel ilon por interkompreniĝo, paca kunvivo kaj multflanka kunlaboro inter nacioj kaj helpe de tiu ĉi lingvo disvastigadi scion pri Ĉeĥoslovakio ekster nia lando, ĉefe pri kulturaj valoraĵoj de nia popolo kaj el eksterlando akiri kulturajn konojn kaj ilin celkonforme utiligi.
- edukadi niajn membrojn
- instrui la lingvon Esperanto
- organizi kaj kunordigi la agadon de la membroj
- eldoni novajn librojn kaj aliajn esperantaĵojn
- informi la neesperantistan socion pri la celoj de la Asocio kaj pri la Esperanto-movado ĝenerale
- subskribi kontraktojn kun diversspecaj esperantistaj kaj neesperantistaj organizoj enlandaj kaj fremdlandaj, se tio helpas al plenumo de la asociaj celoj.

2. Sur kiuj agadkampoj aŭ en kiuj direktoj disvolviĝas la aktivecoj de ĈEA?

Iomete mi jam respondis en la unua parto. Por ke nia Asocio povu plenumi ĉiujn taskojn, ni fondis diversspecajn sekciojn kaj komisionojn. Krom tio funkcias profesia sekretariejo.

La strukturo de nia Asocio ne estis klara de komenco. Jam lá fondiĝo en la jaro 1969 lasis kaj en Statuto kaj en la praktika vivo iujn restojn de la siatempaj eventoj, kiujn ni devis poste paŝon post paŝo ŝanĝi kaj plibonigi. Sed tia estas la vivo. Eĉ nun ne estas ĉio definitiva kaj dum nia kongreso, kiu okazis aprile ĉijare, ni akceptis kelkajn ŝanĝojn, kiuj plibonigos, kiel ni esperas, la sistemon de la gvidado kaj pligrandigos eblecojn de agado. Ni iras la vojon de integriĝo de niaj fortoj, ankaŭ en kadraj aferoj.

Certe ne ĉio iras glate tiel, kiel mi diras, kaj ankaŭ okazas miskomprenoj, kiam homoj preferas lokajn interesojn anstataŭ tutasociajn.

Nia agado nun direktiĝas ĉefe al la plibonigo de la pedagogiaj konoj de niaj instruistoj. Ni serĉas profesiajn instruistojn pere de la pedagogia sekcio. Interesuloj havas la eblecon pruvi siajn sciojn pri Esperanto en asocia ekzameno, kiu ne estas simpla.

En la teknika kampo bone laboras niaj Scienc-teknika, Fervojista kaj Medicinista sekcioj. Ne en lasta loko estas vigla ankaŭ nia MEM-sekcio, kaj ni esperas, ke ĝia laboro ankoraŭ pliboniĝos.

3. ĈEA nun ekzistas pli ol 10 jarojn. Bonvolu mencii la ĉefajn kaj plej gravajn atingojn dum la agado de via Asocio.

Laŭ mi la plej gravaj atingoj dum tiuj lastaj jaroj estas:

- konsolidigo de la Asocio el politika kaj socia vidpunktoj,
- akcepto de longjaraj strategiaj planoj kaj taktikaj paŝoj,
- profundigo kaj firmigo de demokrata centralismo en la gvidado de la asociaj organoj,
- restarigo de solidaj fundamentoj por konstrui vere fortan Asocion pere de elekto de sufiĉe vasta kaj kadre preparitaj grupoj de funkciuloj,
- malakcepto de tendencoj, ke Esperanto estas memcelo kaj ne ilo por la esperantistoj, do eliro el la izoliĝo al la neesperantista socio,
- ekonomia memstareco.

4. Ĉu vi pretas paroli pri iuj interesaj planoj, kiujn ĈEA intencas realigi dum la estonteco?

Pri planoj por la estonta jaro klare parolas nia programo, kiun pridiskutis la delegitoj de nia 3a kongreso en Praha ĉijare. Estas ankaŭ novaj strategiaj kaj taktikaj punktoj. Se mi pri tio diru unu frazon: Ni do volas atingi, ke la laboro en la Esperanto-movado estu same valore pritaksata kiel ĉiu alia laboro por nia socio.

Certe tio ĉefe dependas de ni esperantistoj mem. Kaj tie ĉi nin atendas ankoraŭ multe da laboro.

Por la asociaj membroj ni volas prepari pli da eblecoj praktike uzi siajn lingvajn konojn. Al la fremdlandaj esperantistoj ni volas helpi pli bone kaj pli simple ekkoni nian esperantistan movadon, nian landon kaj la vivon de niaj homoj.

5. Kiel vi pritaksas la ĝisnunajn kontaktojn inter la ĉeĥaj esperantistoj kaj tiuj el GDR?

Ni bone scias, ke niaj esperantistoj havas jam longjarajn personajn kontaktojn kun geamikoj el via lando. Tio estas normala. Ofte ni kunvenadis, ankaŭ hazarde, ĉefe proksime de la ŝtata limo, ĉu en Ostrov, ĉu en Jablonec, ĉu en Usti, ĉu en Dresdeno, Karl-Marx-Stadt, kaj lastatempe ankaŭ dum la Leipziga Foiro.

Tial ni estis vere kontentaj, kiam niaj kontaktoj ricevis oficialan bazon per la subskribo de interkonsento inter CLE kaj ĈEA.

Ni estas ĉe la komenco, sed ni esperas, ke dum la estontaj jaroj ĉefe niaj lokaj grupoj intime kunlaboros kun ĝemelaj Esperantaj grupoj en viaj urboj. Certe tia fruktodona kunlaboro devas alporti multe da novaj stimuloj por nia laboro.

3-a kongreso de ĈEA

Je la 10a kaj 11a de februaro 1979 okazis en Prago la 3-a Kongreso de ĈEA kun la celo bilanci la ĝisnunan laboron kaj evoluon, kaj elekti la novan estraron. En la kongreso partoprenis delegacioj el Bulgario, GDR (s-roj Heinel kaj Linke), Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Slovakio. Reprezentantoj de UEA (d-ino Szabo-Felsö) kaj de MEM (s-ro Koĉvara) salutis la kongreson.

La kongreson honorigis per ĉeesto reprezentantoj el ŝtataj kaj sociaj institucioj.

Karakteriza signo de la kongreso estis la kreema kaj vigla atmosfero. La prezidanto de ĈEA, Josef Vitek, donis tre precizan kaj klaran raporton pri la laboro de la Asocio. Aliaj raportoj kompletigis ĝin, i. a. de s-ro Křimský pri la laboro kaj situacio de la sekretariejo. La diskuto, parte en Esperanto parte en ĉeĥa lingvo, estis vigla kaj sincera. La tuta kongreso pasis eksterordinare precize kaj bonorganizite. La eksterlandaj gastoj estis kontente informitaj per la ĉiam resuma traduko de l'ĉeĥlingvaj partoj en Esperanto. La delegitoj elektis novan asocian estraron. Nova prezidanto de ĈEA fariĝis d-ro Jaromir Jermař. La ĝistiaman prezidanton Josef Vitek oni elkore adiaŭis. Li fariĝis honora membro de ĈEA. S-ron Zdenek Křimský oni denove elektis sekretario.

Nome de la esperantistaro de GDR s-ro Heinel salutis la kongreson, elstariginte la sukcesan kunlaboron inter ĈEA kaj CLE surbaze de la amikeckontrakto.

La kongreso ankaŭ havis interesan kulturan programon: kantis la operkantistoj Fridlevič kaj Smička. La aktorino Eva Seemanová, bone konata de la geesperantistoj en GDR, prezentis kune kun kvar studentinoj tre amuzajn foirkantojn („Moritaten").

Entute la kongreso klare montris la gravajn atingojn de la Ĉeĥa Esperantomovado.

S. Linke

KONTINENTO SEN INTERPRETISTOJ

Tiel nomiĝas ĉeĥlingva 140 paĝa libro de O. Kníchal (eld. ĈEA). La aŭtoro, de kiu aperis jam kelkaj verkoj pri aŭ en Esperanto, skizas en dek ĉapitroj la problemon de la multlingveco, historion de la internacilingva ideo kaj de la Zamenhofa lingvo kaj ties movado. Aplikado, atingoj kaj perspektivoj de Esperanto estas prezentitaj laŭ la karakterizaj eventoj kaj fenomenoj (literaturo, scienco, laborista movado, agado ĉe UN, problemoj de la komuna lingvo, ktp.). Selekto de kelkaj gravaj dokumentoj kaj eldiroj pri Esp-o kompletigas la verkon, kiu estas la unua tiaspeca en la ĉeĥa lingvo. La enlanda gazetaro publikigis el ĝi pasintjare plurajn erojn.

---

6. En kio, laŭ vi, konsistas la signifo de la amikeckontrakto inter la esperantistaj asocioj de ČSSR kaj Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo?

Oni povas diri, ke la amikeckontrakto definitive metis finon al la provizoreco kaj improvizado en niaj kontaktoj. Per la kontrakto niaj ambaŭ Asocioj (la ĉeĥa kaj slovaka) kun via organizo tute oficiale kunlaboras. Kaj tio estas certe, permesu tion diri, historia atingo.

La redakcio de „der esperantist" tre kore dankas pro la intervjuo.

Komuniko

pri la XIIa Konsultiĝo de Esperanto-organizaĵoj de socialismaj landoj

De la 6a ĝis la 9a de aprilo 1979 okazis en Viŝegrad (Hungario) la XIIa Konsultiĝo de E-organizaĵoj de socialismaj landoj, kiun partoprenis la reprezentantoj el Bulgario, Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko, Germana Demokratia Respubliko, Hungario, Pollando, Soveta Unio, Vjetnamio kaj observanto el Jugoslavio, kiu ne partoprenis la voĉdonadon.

La partoprenintoj pridiskutis ĉefajn taskojn de E-movado kaj interŝanĝis spertojn pri ties realigado en la kadro de la pliprofundiĝanta kunlaboro inter Esperantaj organizaĵoj de la landoj kun simila socia strukturiteco.

Dum la diskuto estis substrekita aktiva partopreno de E-movado en la tutmonda packonstruado.

La Konsultiĝo akceptis la deklaron esprimanta apogon por la pacdefendo de Vjetnamio.

La partoprenintoj esprimis dankon pro la modela organizo de labor-kondiĉoj kaj tre gastama prizorgo al la gastigantoj t. e. Hungara Esperanto-Asocio.

Viŝegrad, la 9an de aprilo 1979

Rezolucio

La XIIa Konsultiĝo de E-organizaĵoj en socialismaj landoj esprimas sian fortan indignon pri la malica agreso de Ĉinio kontraŭ la pacama Socialisma Respubliko Vjetnamio, pri la barbaraj krimoj de la ĉinaj trupoj kontraŭ la civila vjetnamia loĝantaro.

La Konsultiĝo esprimas sian solidarecon kun la multsuferinta vjetnama popolo, heroa batalanto por sia libero kaj sendependo kaj alvokas ĉiujn esperantistojn aliĝi al la progresemaj fortoj en la mondo, agantaj subtene al la vjetnamia popolo. Agresanto for el Vjetnamio!

Vivu paco en sudorienta Azio kaj sur la tuta tero!

Televida programo en Pollando

Eksterordinare grandan sukceson havis la polaj esperantistoj antaŭnelonge. La 18an de marto la 2a televida kanalo emisiis 1-horan programon pri Esperanto en la ciklo „Ekrano de raportisto". Ĉifoje la ekrano portis la titolon „Esperantaj vojoj". En la programo enestis filmeto pri la 63a UK en Varna, duonhora diskuto de ĵurnalistoj-esperantistoj (Krystyna Kolinska, Marius Dastych, Jerzy Uspienski — aŭtoro de la programo).

Post la diskuto sekvis fragmento de la pola televida filmo „Por ke homo komprenu homon". La tuta programo estis labora. La programon vidis pli ol 17 milionoj da spektantoj.

Gratulon al nia amiko:

Nikola Aleksiev

Skribi pri Nikola Aleksiev, kiu la 29an de junio 1979 fariĝis 70-jara, estas sufiĉe malfacile. Kiel almenaŭ mencii la plej gravan pri tiu admirinda jubileulo? La modesta homo, la laborema funkciulo, la konsekvenca internaciisto, do simple: la komunisto Aleksiev! Li estas tuta koncepto. Li estas unu el la plej fortaj kaj rimarkindaj figuroj de la bulgara kaj entute de la nuntempa internacia Esperanto-movado. La fama bulgara verkisto akademiano Georgi Karaslavov („La bofilino“ aperis 1959 ankaŭ en Esperanto), kiu studis kune kun Nikoltŝo Bogdanov, kiel Nikola Aleksiev nomiĝis kiel studento, iam nomis lin „ĉizeiita ŝtono“, ĉar li ĉie kapablas majstri la starigitajn taskojn. Ho jes, granita figuro kun varma koro!

Jam kiel studento ĉe la agrikultura fakultato li agadis kiel komunisto redaktinte i. a. la „Studentska tribuna“ (studenta tribuno), progresema revuo de la bulgaraj studentoj, disvastiginta la ideojn de la bulgara komunista partio. Kompreneble jam frue li fariĝis „daŭra kliento“ de la polico, troviĝis en ties registroj.

Kiel socia aganto li tre frue pruviĝis tre kapabla, kunorganizis strikojn, laboris kiel ĵurnalisto, agadis kiel engaĝita laborista esperantisto en la tempo de la blanka teroro en Bulgario.

Pli ol 7 jarojn li pasigis en la karceroj de la porfaŝisma Bulgario kaj pro sia komunista agado estis forpelita de la universitato. Tre frue Nikola Aleksiev trovis la vojon al la revolucia sindikata movado, kie li ekde 1930 fariĝis unu el ties gvidaj funkciuloj.

De 1930—1934 li estis redaktoro de la sindikata semajnrevuo „Edinstvo“ (Unueco), fariĝis fondinto kaj ĉefredaktoro de la revuo „Zname na truda“ (standardo de laboro) de 1944—1945 kaj ĉefredaktoro de 1946—1952 de la centra organo de la bulgaraj sindikatoj „Trud“ (laboro). Li estis de 1948—1962 sekretario de la Centra Konsilantaro de Sindikatoj. Krome li aktivas en la prezidio de la Bulgara Packonsilantaro, en la prezidio de la Patrolanda Fronto, estas membro de la nacia Konsilantaro por Sobreco. 1958 k-do Aleksiev fariĝis kandidatmembro de la Centra Komitato de la Bul-

gara Komunista Partio. 1961—1964 li estis vicprezidanto de la Komitato por Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun eksterlando.

Lia porpaca agado, speciale en la Esperanto-medio, alportis al li mondvastan estimon, tiel, ke li fariĝis membro de la Tutmonda Packonsilantaro. Kelkfoje li havis tre utilajn kontaktojn kun la prezidanto Romesh Chandra.

Centoj da publikaĵoj, en la bulgara kaj en Esperanto fontis el lia plumo. (1977 ekzemple aperis en Sofio elekto el liaj kontribuoj „V redicite na klasata“ [„en la servo de la klaso“]).

Specialan ligon N. Aleksiev havis al Georgi Dimitrov. Kiam la bulgara laborista gvidanto 1933 estis tirita antaŭ la faŝistan tribunalon en Leipzig, Nikola Aleksiev kunhelpis organizi la internacian protestmovadon kaj redaktis koncernan revuon. Post la liberigo li ofte havis kontakton kun Dimitrov. Pri tio baldaŭ aperos memoroj en Esperanto.

La internacian lingvon Nikola Aleksiev jam lernis kiel junulo. Li tuj komprenis, ke Esperanto devas fariĝi ilo por aktiva politika agado en la servo de la laboristoj.

Li estis unu el la fondintoj de la Bulgara Laborista Esperanto-Asocio BuLEA, kiun li de 1929 ĝis ĝia malpermeso flanke de la reakcia reĝimo en 1934 gvidis.

Post la liberigo N. Aleksiev apartenis al la plej aktivaj esperantistoj de BEA kaj estis de 1964—1976 ĝia prezidanto. Sed ankaŭ en la internacia Esperanto-movado Nikola Aleksiev ludis kaj ankoraŭ ludadas tre gravan rolon. La evoluo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM) estas intime ligita kun lia nomo. De 1963—1978 li estis seninterrompe ĝia prezidanto kaj 1978 fariĝis honora prezidanto de MEM. Ankaŭ en UEA, membro de la komitato, li aktive kunlaboras. Grandan laboron li ankaŭ faris kiel prezidanto de la Lokaj Kongresaj Komitatoj de la Universalaj Esperanto-Kongresoj. 1963 en Sofio kaj 1978 en Varna. Apenaŭ eblas mencii ĉion nur plej gravan, kion faris la jubileulo por la internacia kaj bulgara Esperanto-movadoj.

Multaj esperantistoj de Germana Demokratia Respubliko lin konas tre bone. Li estas amiko de nia lando kaj kelkfoje ĝin vizitis, laste kiel oficiala honora gasto de la prezidio de Kulturligo en 1977, okaze de ĝia IXa Kongreso.

Multe ni skribis pri la agado de Nikola Aleksiev. Nur tre nekompleta estus la bildo pri li, se oni ne akcentus lian unikan ĉarmon kiel homo. Li disponas pri iu tute speciala forta, profunde humanisma elradiado, kiu onin tute kaptas. Ĉiam treege modesta, gaja, plena da tipe bulgara popola humoro, li kapablas atentokapte rakonti, peri siajn spertojn. Demandu ion al Nikola Aleksiev, li certe respondos per iu travivaĵo, ŝerco aŭ bulgara historia anekdoto. Ĉar, kiel li ŝatas ŝerce diri „tio okazas eĉ en la plej civilizitaj familioj“.

Mi havis (kaj espereble ankoraŭ multfoje havos) la feliĉon ofte kaj longe kontakti kun Nikola Aleksiev. Li apartenas al tiuj komunistoj, kiujn mi havis la feliĉon ekkoni, kiuj profunde influis min.

Detlev Blanke

Kiel preleganto en Bulgario

Invitite de la ĉefa Estraro de Bulgara Esperanto-Asocio (BAE) mi havis la tre agrablan okazon prelegi en la universitatoj de Plovdiv kaj Sofio kaj antaŭ esperantistoj. Mi ja supozis, ke miaj bulgaraj amikoj certe preparos bone la restadon, sed ke ĉio donos tian imponan rezulton, mi, sincere dirite, ne estus atendinta. La restado mia de la 23a ĝis 28a de aprilo 1979 fariĝis neforgesebla rerenkonto kun aminda popolo, kun forta Esperanto-movado.

Ne nur profunde reimpresis min la proverbe kora gastamo de la bulgaroj. La bonstataj urboj, la pejzaĝo, la afablaj homoj — ofte kaj prave laŭdataj, estis krome la bonega organizo de mia restado entute, kiun tre lerte kaj sukcese certigis la gastigintoj. Plovdiv, la due plej granda urbo de Bulgario, konata pro la internaciaj foiroj, havanta ĝemelajn ligojn al Leipzig, tiu Plovdiv sole meritus tutsemajnan restadon. La Distrikta Estraro de BEA, sub la gvido de ĝia prezidanto *k-do Dančev*, tie havas propran oficejon, kiun gvidas juna, tre erudicia kaj ĉarma virino, *s-ino Fani Miĥajlova.* Ŝi estis la ĉie sentebla kaj en la urbo varme akceptata kaj meritas specialan dankon.

Antaŭ ĉ. 130 studentoj de la universitato mi prelegis en Esperanto (kun traduko de Fani Miĥajlova) pri *„Rezultoj de interlingvistiko: Raciigo de la internacia lingva komunikado“*. La prelego elvokis tre viglan diskuton. En la majstre konstruita junulara domego de Plovdiv hejmas diversaj kluboj, inter ili tiu de „Scienc-fikcio“. Bone, la temo *„La lingvo de la estonto — la estonto de la lingvo“* laŭis al la karaktero de tiu klubo. Neformala enkonduko tuj rezultigis ege viglan kaj tre kleran diskuton. Tre „facile“, se ne diri leĝere, la junaj diskutintoj surtabligis bazajn demandojn de la moderna lingvoscienco . . . lernis ankaŭ la enkondukinto. Antaŭ la membroj de la Esperanto-societo „Kulturo“, siatempe distingita per la ordeno „Kiril i Metodi“, kies gvidantino estas *s-ino Kurteva,* mi havis la okazon prezenti kelkajn trajtojn de la Esperanto-movado en la 30jara

---

Principofirma sed elasta kaj ĉiam kun iu speciala ĉarmo, propra al li, li aliras la problemojn. Komprenema diskutanto, preta akcepti kaj respekti alies vidpunktojn, li sin montras bonega konanto de la Esperanto-movado kaj ties bezonoj.

Plena, batalriĉa, multflanka kaj sukcesa vivo ĝis la 70a naskiĝtago, kiun ni komune festos kun nia amiko el la sunriĉa Bulgario. Ankoraŭ multajn jarojn da suno kaj sano, da kreiva laboro, sukcesoj kaj feliĉo, tion mi kaj certe ĉiuj esperantistoj de GDR deziras al nia amiko Nikola Aleksiev.

Detlev Blanke

Germana Demokratia Respubliko. Dum tiuj Plovdivaj tagoj tamen ankoraŭ restis tempo por admiri la arkeologie ege interesan urbon, kies valoraj antikvaj kaj tradicibulgaraj kvartaloj estas sisteme flegataj kaj restaŭrataj. Florantaj betoj en verdverdaj parkoj! Tio dum aprilo, kiam la vetero en Berlino grizis.

Mi multon lernis pri la agado de BEA en Plovdiv kaj esperas, ke la kunlaboro inter la esperantistoj de Plovdiv kaj GDR, speciale de Leipzig, estonte plifortiĝos kaj plikonkretiĝos.

En Sofia la konataj kamaradoj *Aleksiev, Gorov, Valev, Marinov, Kanev, Karucin, Papasov* kaj aliaj meritas specialan dankon. Ili tre afable ĉion preparis. La prelegon en la universitato de Sofio, kie 1963 okazis la 48a Universala Kongreso, organizis *Kunĉo Valev,* la konata lektoro por Esperanto en la universitato, sekretario de BEA. Pli ol 100 aŭskultantoj sekvis la prelegon *„Interlingvistiko kaj internaciaj lingvoj“*. En Sofio ekzistas ĉirkaŭ 16 esperantistaj societoj. Ne mirinde, ke pli ol 300 homoj (!) kunvenis vendrede vespere (27. 4. 78) por partopreni festan programon omaĝe al la 30jara datreveno de la fondiĝo de GDR. Post enkonduko de la prezidanto de BEA, la verkisto *Ĥristo Gorov,* mi havis la eblecon fari koncizan paroladon. Poste sekvis vere kortuŝa programo. Koruso kantis, artistoj recitis poemojn (i. a. ankaŭ „Pripensu sinjor‘ senatoro“ de *Manfred Arnold,* vidu „der esperantist“ 4/78). Poste sekvis la esperantigita kolorfilmo „Kvar ĉapitroj GDR“.

Dum mia restado en Plovdiv kaj Sofio ankaŭ restis tempo por multaj valoraj kontaktoj kaj interparoloj. Tiel ekzemple mi povis sonbendintervjui la konatan veteranon de la Bulgara Laborista Esperanto-Asocio (BuLEA), *Ivan Keremedĝiev-Esperov.* Kaj restis tempo por priparoli kun kelkaj kompetentuloj estontan sciencan agadon en Bulgario.

Entute, la restado mia en Bulgario denove konfirmis min pri la celkonscia socialisma konstruado, pri la multflankeco de la bulgara Esperanto-movado, la ĉarmo de la bulgaraj homoj kaj pri la beleco de tiu lando. Ĉio-ĉi kaj multo alia estas pli ol sufiĉa kaŭzo por pliintensigi la rilatojn inter niaj ambaŭ landoj ankaŭ helpe de la Internacia lingvo.

★

En la Karl-Marx-Universitato

En la kadro de kvalifika kurso por lingvistoj laborantaj en la „Sekcio fremdaj lingvoj“ de la Karl-Marx-Universitato Leipzig, la 9an de marto 1979 prelegis d-ro Detlev Blanke pri la temo „Komunikilo planlingvo. Aktuala stato, problemoj, perspektivoj, kun speciala konsidero de Esperanto“. La prelegon ĉeestis ĉirkaŭ 50 lingvistoj, kiuj antaŭe estis ricevintaj tezojn kun literaturindikoj. La duhora aranĝo bone sukcesis.

Esperanto-libro por kultura datreveno de UNESKO

Kadre de la kulturaj datrevenoj de Unesko ekde la 22. VII. 78 ĝis la 22. VII· 79 oni solenas en la mondo Jaron de Janusz Korczak. Ĝi intence kuniĝos parte kun la Jaro de la Infano, proklamita dum 1979, ĉar Korczak estis granda amiko de la infanoj kaj nelacigebla batalanto por la infanaj rajtoj. La Korczak-Jaro estas omaĝo al la granda filo de Pollando, pedagogo, edukisto kaj verkisto kies eduk-teorioj kaj praktiko fariĝis konataj mondskale, speciale en la pedagogiaj medioj. *Kun ĝojo ni povas nun komuniki, ke okaze de la Korczak-Jaro en Pollando aperos libro pri J. Korczak ankaŭ en Esperanto.*

La famo de Korczak fontas el du faktoroj — li estas kreinto de propra eduk-skolo, kiun studas kaj disvastigas internacia movado; sed inter pli vasta publiko diskonigis lian nomon lia morto — dum la II-a mondmilito li decidis iri en la gaskamerojn de la hitlera mortotendaro en Treblinka por ne forlasi „siajn" mortkondamnitajn infanojn el la juda orfejo en varsovia getto. Malgraŭ plurfoja ebleco fuĝi el la getto helpe de polaj amikoj. Tiele plej profunde demonstris J. Korczak sian komprenon de la ligo inter proklamata teorio kaj vivpraktiko.

La jubileaj solenadoj ne havas nur festan karakteron. Okazas ankaŭ pluraj sciencaj konferencoj, en kiuj specialistoj pritraktas la sciencan kaj — intime kun ĝi ligitan — literaturan kreadon de Korczak. La plej granda tia internacia konferenco okazis en Varsovio en oktobro 1978. Aperos ankaŭ novaj diverslingvaj studoj pri li kaj pliaj biografiaj libroj.

Al la ĉi-lastaj apartenas la E-lingva libro menciita supre. Verkis ĝin elstara pola pedagogo Alicja Szlazakowa kaj tradukis en Esperanton Jerzy Uśpieński. La libro havas simplan titolon: „Janusz Korczak", sed ĝi estos tre bunte eldonita far la „Eldonejoj Pedagogiaj kaj Dernejaj". Tio estas kvazaŭ negranda albumo riĉe ilustrita per historiaj fotoj kaj per grafikaĵoj, i. a. de alilandaj artistoj, kiuj omaĝis Korczak per siaj verkoj. La teksto estas vive skribita biografio, riĉe dokumentita per citaĵoj el la verkoj de Korczak kaj aliaj materialoj. Ĝi prezentas ne nur la heroon, sed samgrade lian verkon, liajn ideojn kaj idealojn tre aktualajn en la nuna epoko de valor-kaoso. Ne sen emocio la aŭtorino prezentas la komprenon kaj opiniojn de Korczak pri la esenco, graveco kaj komplikeco de la infan — kaj junaĝo en la procezo de la homa maturiĝo. La profunda, realisma kaj kunsentema kompreno de la homo permesis al Janusz Korczak formuli principojn pri la homa edukado kaj memedukiĝo, kiuj taŭgas ne nur por edukistoj. Ilin povas — eble eĉ devas! — apliki la gepatroj kaj ĉiuj homoj, kiuj deziras plibonigon de la interhomaj rilatoj. Pro tio ĝuste la scio pri J. Korczak, la kono de liaj pensoj kaj ideoj esprimitaj en la pedagogiaj verkoj sed ankaŭ en la riĉa porinfana / sed ne sole! / literatura verkaro estas tre populariginda. La „Korczak-Jaro" pruvas tion. Por la esperantistoj estos certe interesa informo, ke Korczak estis aktiva simpatianto de Esperanto. En la studentaj jaroj li kolegumis kun la filo de d-ro Zamenhof, Adamo. Plej verŝajne li konis la aŭtoron de Esperanto. Kaj li devis kompreni la valorojn de IL por la internacia kunagado de

IFER 79

Denove Distrikta Laborrondo Esperanto en Leipzig, sub lerta gvido de Jürgen Hamann, membro de la prezidio de CLE, organizis la Internacian Foiran Esperantistan Renkontiĝon (IFER).

Pli ol 120 partoprenintoj el Bulgario, ČSSR, FRG, GDR, Hungario kaj Pollando renkontiĝis de la 9a ĝis 11a de marto 1979 en la foira urbo.

Vendrede la 9an de marto, post solena malfermo kaj aŭskulto de la salutparoladetoj, oni interkonatiĝis ĉe vino kaj muziko. Sabate, la 10. 3. 79, la partoprenintoj konatiĝis kun la urbo kaj vespere spektis interesan diasonrevuon „Jen kiel ni kreskis", kiu montris en originala maniero la evoluon kaj atingojn de la 30jara GDR. Koloraj diapozitivoj, akustikaj elementoj de la sonbendo, legata teksto kaj skeĉoj donis buntan bildon kaj multflankan impreson.

Malgraŭ kelkaj neperfektaĵoj oni devas gratuli al la Leipziganoj pro tiu interesa eksperimento. Dimanĉe antaŭtagmeze d-ro Detlev Blanke prelegis pri la temo „La Esperanto-movado kaj scienco". Post solena fermo de IFER 79 la partoprenintoj aŭ reveturis hejmen aŭ ankoraŭ restis ĉe geamikoj en Leipzig, kie ĝuste dimanĉe oni oficiale malfermis la Foiron.

Oni devas diri, ke la organizintoj, precipe Jürgen Hamann, Rolf Beau kaj edzino, Michael Behr kaj la nelacigeblaj maljunaj membroj de la leipziga grupo vere multon entreprenis. Tre detala skriba materialo pri IFER 79, filatelia objekto de Rudolf Burmeister, riĉa libro-oferto, solidareca loterio por Vjetnamio. Ankaŭ ĉijare oni organizis fotokonkurson, kies unua premio estas senpaga partopreno por IFER 80. La bonŝancon por 1979 havis polino. Valoras krome mencii, ke aperis speciala porokaza poŝtstampo. Krome okazis gazetara konferenco. IFER 79, kiun patronis Centra Laborrondo, estis sukcesa paŝo sur la vojo organizi pli kaj pli altnivelaj internaciajn renkontiĝojn en GDR.

---

la infanoj, konsiderata de Korczak unu elinter gravaj eduk-faktoroj. Pruvas ĉi tion i. a. la fakto, ke la iniciatita de li kaj longtempe gvidata, unua en Pollando infan-junulara gazeto / kiun junularo redaktis k. verkis / la fama „Malgranda Revuo" / „Maly Przeglad" / aperadis en Esperanto ! Tio okazis unufoje jare, la 18-an de majo, en la Tago de Bonvolo, sed en tiu ĉi tago la kompleta numero de la gazeto estis esperantlingva. Skribas pri tio ankaŭ Alicja Szlazakowa.

Pro tiuj kaj aliaj motivoj la libro — aperanta ankaŭ en la lingvoj: angla, franca, germana k. rusa — la plej multajn legantojn devas trovi inter la esperantistoj. Parenteze ni aldonu, ke la E-verzio havas la plej altan eldonkvanton kaj tio dank al la financa helpo de Pola Esperanto-Asocio. La libro aperos komence de la 1979 j.

La 20-an de februaro 1979 Erich Kästner fariĝintus 80jara.

Erich Kästner

La mondo konas Erich Kästner kiel talentan poeton, kiel aŭtoron de porinfana literaturo kaj kiel rakontinton de humoraĵoj. Sed li estis pli atentinda homo.
Liaj gepatroj, kvankam en modesta pozicio, ebligis al li, viziti gimnazion. Antaŭ la lernejjara fino li devis fariĝi soldato, ĉar daŭris ankoraŭ la unua mondmilito.

La ĉefserĝento per ĉikanadoj faris lin kormalsana kaj tiu ulo iel zorgis, ke Kästner fariĝis humanisto, kiu malŝategis militarismon kaj faŝismon. En liaj poemoj el la unua epoko de lia verkado tio klare estas ekkonebla. Per ironio li skizis la samtempanojn kaj neniu estis por li pli abomeninda, ol sklavecaj karakteroj. Li tion pruvis dum tiuj ĉi dek jaroj de faŝisma reĝimo. Li ĉeestis eĉ la forbruligon de siaj verkoj en la jaro 1933 en Berlin. Li ne rajtis verki dum la faŝisma reĝimo, sed li notis, notis kaj notis. Liaj skizoj post la milito tion pruvas. Senlace li akuzis la mildan traktadon de faŝistaj krimuloj. Li vizitis koncentrejojn kaj publikigis pri ili hontigajn kaj timigajn faktojn.

Dum la faŝisma epoko li skribis ekster Germanio, kaj al li ni dankas el tiu ĉi tempo tekstojn por filmoj kaj romanojn por infanoj. Tiuj ĉi literaturaj trezoraĵoj montras lin kiel serenan humaniston kaj ili certe kaŭzas lian famon inter la aŭtoroj internaciaj. En multaj landoj lia krimromano por infanoj „Emil kaj la detektivoj" estas uzata kiel instrumaterialo por la germana moderna lingvo.

Pri si mem li skribis: „Mi estas bakisto, ne sukeraĵisto. Mi bakas panon, solidan, nutran kaj taŭgan panon, kiu nutras la klientaron kaj la bakiston". Lia liriko, kiun li nomis poruza liriko (Gebrauchslyrik), estis sen superfluaĵoj, klara kaj modela. Laŭ la deziroj de siaj gepatroj Erich Kästner fariĝu instruisto. En analizo pri si mem, li konfesis, ke li estas kaj restas instruisto, kiu instruas infanojn kaj plenkreskulojn. Li celis, plibonigi la homojn.

Ni deziras al ĉiuj nacioj tiajn instruistojn, kiuj tiel bone komprenas instrui infanojn kaj plenkreskulojn. Erich Kästner ankoraŭ longe vivos en la koroj de la popolo, ĉar li ne skribis por altranguloj, por elito, por elstaruloj, sed por la popolo.

Rudolf Zimmermann

Ni funebras

– pro la forpaso de la laborista esperantisto el Berlin, Hans Manske, la 15an de februaro 1979.

Interlingvistika seminario por lingvistoj

La fakgrupo interlingvistiko/esperantologio ĉe Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR entreprenis pluan paŝon por popularigi interlingvistikajn konceptojn en GDR tiel proponante al lingvistoj okupiĝi pri la lingva problemo ĝenerale kaj speciale pri Esperanto.

En la alloga ĉebaltmara ripozloko Ahrenshoop, CLE en Kulturligo de GDR okazigis de 16. — 19. 4. 1979 „Sciencan Seminarion pri Interlingvistiko". Oni invitis ĉ*iujn* universitatojn kaj altlernejojn de GDR sendi interesitajn lingvistojn al tiu seminario. La invito estis riska eksperimento. Ĝi estis testo:

1. Ĉu entute reagos la lingvistoj?
2. Se jes, ĉu la fakgrupo povos esti kapabla partnero en prelegoj kaj diskutoj?
3. Kiaj estos la sekvoj de la seminario?

Eĉ se neniu lingvisto estus aliĝinta al la seminario, la informmaterialo pri la temo (i. a. ampleksaj tezoj) almenaŭ atentigus pri la ekzisto de scienca okupiĝo pri la monda lingvo problemo, pri interlingvistiko, pri Esperanto. La testo donis surprizajn rezultojn. Anonciĝis multe pli ol la kapacito de la seminario kapablis akcepti. Partoprenis entute reprezentantoj de 4 universitatoj, 3 pedagogiaj altlernejoj, 4 inĝenieraj altlernejoj, 2 pliaj altlernejoj, de la Akademio de la Sciencoj de GDR, de du centraj institutoj, komputila esplorcentro (Robotron — Dresden) kaj de Akademie-Verlag (Lektorato Lingvistiko). La 27 lingvistoj kaj 5 membroj (d-roj Blanke, Dahlenburg, String, Schüler, Hußner) de la fakgrupo interlingvistiko entute aŭskultis 11 prelegojn kaj abunde diskutis pri bazaj problemoj de interlingvistiko.

Valoras mencii, ke du universitataj profesoroj, unu docento kaj unu supera asistanto mem transprenis temojn.

Oni aŭskultis jenajn prelegojn:

- Aspektoj de la internacia lingva komunikado kaj la problemo de la planlingvoj (d-ro D. Blanke)
- Socia komunikada bezono kaj mondaj helplingvoj (doc. d-ro Otto Troebes, univ. Halle)
- La problemo de artefaritaj mondlingvoj ĉe J. Baudouin de Courtenay (prof. d-ro Frank Häusler, ped. altlernejo Magdeburg)
- Basic English (asist. Wolf-D. Wendt, Humboldt-Universitato, Berlin)
- Esperanto en teorio kaj praktiko (d-ro D. Blanke)
- Interlingvistikaj problemoj de polisemio en la komputila lingvoscienco (prof. d-ro Georg Meier, Humboldt-Universitato, Berlin)
- Esperanto kiel esplorobjekto per komputiloj (d-ro Paul String, Robotron Dresden)
- Internaciaj spertoj pri Esperanto kaj komputiloj (d-ro Martin Schüler, Akademio)
- Planlingvaj internaciaj mondkongresoj en bildo kaj sono (d-ro D. Blanke)

Fachkommission Technik

Der Zentrale Arbeitskreis Esperanto beabsichtigt, eine Fachkommission Technik zu gründen.

Techniker, technisch interessierte Ökonomen und Vertreter anderer Berufe, die an einer fachlichen Arbeit im Rahmen der zu bildenden Fachkommission Technik beim Zentralen Arbeitskreis Esperanto interessiert sind, mögen sich bei Herrn Richard Partecke (59 Eisenach, Am Ofenstein 5) melden. Die zu bildende Kommission wird mit ähnlichen Fachkommissionen der Esperanto-Verbände zusammenarbeiten, ihr Augenmerk vor allem auf die Entwicklung einer Fachterminologie richten und bei der Erarbeitung von Fachwörterbüchern mitwirken. Eine Zusammenarbeit mit entsprechenden nationalen und internationalen Fachgremien soll ebenfalls entwickelt werden.

★

Pri „der esperantist“:

Skribas s-ro Grigorij Berezin el Krasnoarmejsk en letero de 4. 4. 1979:

Mi volas esprimi mian penson pri la aserto de s-ro Göpel en „der esperantist“ n-ro 92 (6/78), ke la revuo „tro emfazas interlingvistikajn problemojn“. Pri tio mi povas diri, ke ekzemple mi abonas „der esperantist“-on plejparte pro tio, ke en ĝi la sciencaj aspektoj estas emfazataj.

★

Junulara grupo de Erfurt ĉe polaj amikoj

La 15an ĝis 17an de marto 1979 la junulara Esperanto-grupo el Erfurt vizitis Vroclavon kaj tie renkontiĝis kun esperantistoj.

La komunaj travivaĵoj donis fortan impulson al pli intensa alproprigo kaj utiligo de Esperanto.

— La planlingvo Esperanto kiel instruobjekto: internaciaj spertoj kaj rezultoj (d-ro Till Dahlenburg)

— La personeconforma efiko de la okupiĝo kun la planlingvo Esperanto (d-ro Joachim Hußner, teknika altlernejo Ilmenau)

— Stato de interlingvistiko en GDR kaj proponoj por estonta agado (d-ro D. Blanke)

La prelegojn sekvis intensaj diskutoj. Ĉiutage la fakgrupo prezentis du diversajn ekspoziciojn (antaŭtagmeze kaj posttagmeze) tiel montrante pli ol 150 sciencajn librojn pri la temo.

La partoprenintaj lingvistoj ne nur estis surprizitaj pri la multo, kion oni jam povas diri kaj montri pri interlingvistiko, ili estis tre kontentaj pri la altnivela ebleco konatiĝi pri scienca objekto ĝis tiam al ili preskaŭ tute nekonata. Ili esprimis sian fortan intereson pri similaj pluaj aranĝoj kaj materialoj. Krome montriĝis, ke ĉiuj prelegintoj de la fakgrupo kapablis plene suverene prezenti kaj diskuti interlingvistikajn problemojn kun (parte eĉ internaciskale) reputaciaj profesiaj lingvistoj.

Tiu seminario estis kuraĝa kaj tre sukcesa paŝo al plua antaŭenigo de interlingvistiko en GDR kaj plene konfirmis la ĝustan komprenon flanke de CLE pri la ŝlosila rolo de la scienco.

La 13a en Ahrenshoop

Ankaŭ 1979 gvidantoj de Esperanto-grupoj kaj kandidatoj por gvidaj funkcioj dum unu semajno seminarie aŭskultis lecionojn pri problemoj de la Esperanto-agado en GDR kaj en internacia skalo en ties teoriaj kaj praktikaj aspektoj. La seminarion gvidis la sekretario de CLE d-ro Detlev Blanke. 32 partoprenintoj el ĉiuj distriktoj de GDR ne forgesos tiun 13an seminarion. Loĝante sub bonegaj kondiĉoj rekte ĉe la Balta Maro en la ripozloko Ahrenshoop ili aŭskultis jenajn prelegojn: 1. „Aktualaj problemoj de la internacia politika situacio“ (Hans Heinel) 2. „Pri la situacio de la internacia Esperanto-movado, sub speciala konsidero de la socialismaj landoj“ (d-ro D. Blanke) 3. „Tradicio kaj nuntempo: rememoroj de laborista esperantisto“ (Ludwig Schödl) 4. „Esperanto en GDR“ (d-ro D. Blanke) 5. „Problemoj de junulara agado“ (Michael Lennartz) 6. „Problemoj de la praktika agado en la Esperanto-grupoj kaj gvidantaroj en Kulturligo“ (Werner Pfennig) 7. „Planlingvoj kaj ties sciencaj aspektoj, sub speciala konsidero de Esperanto“ (d-ro D. Blanke) 8. „Lingvaj karakterizoj de Esperanto“ (d-ro D. Blanke) 9. „Argumentado kaj argumentoj pri Esperanto“ (d-ro D. Blanke). Krom tiuj oficialaj lecionoj oni povis aŭskulti: 10. „Esperanto sur poŝtmarkoj“ (Rudolf Burmeister, diapozitivoj) 11. „Impresoj pri Islando“ (d-ro D. Blanke, diapozitivoj) 12. „Esperanto sur sonbendoj“ (d-ro D. Blanke) 13. „Sekteco en la movado“ (d-ro D. Blanke). Nesubtakseble grava estis la ĉiutagaj lingvaj ekzercoj, kiujn kompetente gvidis la ĉarma polino s-ino Barbara Domański-Schroth, kiu edziniĝis al GDR-ano kaj nun loĝas en Karl-Marx-Stadt.

La seminario por ĉiuj partoprenintoj kostis entute 10 markojn, inkluzivante manĝojn, tranoktadon kaj vojaĝkostojn (kiujn oni repagis). Agrabla atmosfero, viglegaj diskutoj ĉiam kaj ĉie, la serioza kaj tre aktiva interesiĝo flanke de ĉiuj partoprenintoj kaj la celkonscia gvidado de la seminario mem certigis denove altan nivelon kaj malfaciligis la adiaŭon de la Balta Maro.

Partopreninto

Ni kore gratulas

Walter Röhner 70 jara

Unu el la plej aktivaj esperantistoj de nia lando sendube estas la membro de CLE, k-do Walter Röhner el Coswig ĉe Dresden, kiu fariĝis la 29an de majo 1979 70jara.

Multajn jarojn li gvidas celkonscie kaj respondece la Distriktan Laborrondon Esperanto Dresden. Aktiva iama antifaŝisto, la studkonsilisto Röhner laboris en multaj gravaj funkcioj de nia kleriga sistemo kaj dediĉas siajn valorajn spertojn sukcese al la Esperanto-agado. Se la distrikto Dresden ĉiam denove povas raporti pri originalaj valoraj iniciatoj, tio sendube grandparte ŝuldiĝas al la iniciatemo de nia jubileulo. Okaze de la ronda naskiĝtago dankon kaj sanon kaj bonfarton por la estonto deziras CLE.

Werner Habicht 70 jara

Ĉiuj esperantistoj konas lin en la distrikto Erfurt, la honoran prezidanton de Distrikta Laborrondo Esperanto, k-don Werner Habicht, membro de CLE, la iama membro de GLEA povis festi sian 70an naskiĝtagon la 20. 4. 1979. Forte ligita al la revoluciaj tradicioj de nia movado, Werner Habicht (iuj lin nomas akcipitro) havas grandajn meritojn en la konstruo de la Esperanto-movado en la distrikto Erfurt. Ĉiam agema kaj iniciatoriĉa k-do Habicht certe ankaŭ estonte donos sian forton al la movado. Ni deziras al la jubileulo neelĉerpeblan energion kaj bonfartan estontecon.

CLE

Helmut Fuchs 70 jara

La konata esperantista aganto Helmut Fuchs el Pirna ĉe Dresden, la 18an de aprilo 1979 fariĝis 70jara. K-do Fuchs, iama membro de GLEA, aktiva batalinto kontraŭ la faŝismo, estis unu el la fondintoj de CLE, al kiu li apartenis ĝis 1976. Internacie konata kiel MEM-aktivulo (gvidanto de la eldona komisiono de MEM kaj ano de ĝia Internacia Komitato), Helmut Fuchs montriĝis senlaca esperantista aganto por socialismo. Ni deziras al la jubileulo ankoraŭ multajn jarojn de bonfarto.

CLE

Ni elkore gratulas al

- Ino Kolbe el Leipzig, membro de DLE Leipzig, kiu festis sian 65an naskiĝtagon la 28an de februaro 1979
- Willi Vildebrand el Berlin, iama vicprezidanto de CLE, kiu festis sian 75an naskiĝtagon la 6an de marto 1979
- Richard Herr el Potsdam, membro de DLE Potsdam, kiu festis sian 70an naskiĝtagon la 29an de marto 1979
- Alois Jauernig, el Quedlinburg, kiu festis sian 80an naskiĝtagon la 1an de aprilo 1979
- Werner Plate, kiu fine de marto 1979 estis distingita per la ordeno „Standardo de la Laboro".

7a plenkunsido de CLE

La 23an kaj 24an de februaro 1979 okazis en Schwerin la 7a plenkunsido de Centra Laborrondo.

Laŭ la tagordo onj i. a. pritraktis

1. La ĉefajn agadliniojn de CLE por la sekvantaj jaroj (diskutpropono por pli bone kapti la solvendajn taskojn de la estonta agado) 2. aŭskultis interesan studon pri la „personeconformaj valoroj de Esperanto“ de d-ro J. Hußner, 3. kontrolis la realigostaton de la laborplano de CLE por 1979, 4. pridiskutis analizon de la enhava profilo de „der esperantist“ 1975—78 (4 jarkolektoj), kiun prezentis Siegfried Linke kaj 5. aŭskultis diversajn informojn, i. a. pri la stato de la preparlaboro okaze de la 30a datreveno de la fondiĝo de GDR. CLE akceptis rezolucion solidare al la vjetnama popolo sin defendinta kontraŭ la ĉina agreso kaj kolektis 200 markojn por la solidareca konto.

Esperantistoj de GDR kondamnis la ĉinan agreson kontraŭ Vjetnamio

Dum sia 7a plenkunsido en Schwerin (23./24. 2. 1979) Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR energie kondamnis la perfidan agreson de Ĉinio kontraŭ la Socialisma Respubliko Vjetnamio. Solidaran rezolucion pri tio CLE sendis al la vjetnama ambasado en Berlin, al la Packonsilantaro de GDR, al MEM kaj al Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio. Ankaŭ el la distriktoj venis rezolucioj kontraŭ la ĉina agreso, i. a. de la Distriktaj Laborrondoj Leipzig kaj Suhl. La Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo 1979 en Leipzig kun partoprenintoj el 6 landoj same kondamnis la fian akton de la ĉina registaro. Dum la 7a kunsido de CLE, dum la 13a seminario kaj en multaj grupoj kaj distriktoj la esperantistoj kolektis monon kaj asignis ĝin al la konto por solidareco kun Vjetnamio.

Scio kreskis

La direktoro de profesia lernejo, s-ro Alfred Oppermann, ekde 1975 ĉiun duonjaron organizas informhoron pri Esperanto por la lernantoj (16 — 18 jaraĝaj). Dum tiu horo li ankaŭ demandas a) kiu entute jam aŭdis la vorton „Esperanto“ kaj b) kiu eĉ scias, kio estas Esperanto.

Ekde septembro 1975 ĝis septembro 1978 (7 klasoj) la procentaĵo por a) (kiuj jam aŭdis la vorton Esperanto) kreskis de 20 % al 95,5 % kaj por b) (kiuj eĉ scias, kio estas Esperanto) de 12 % al 93 %. Tio estas tre frapa pruvo por la daŭre kreskanta diskonateco de Esperanto en GDR.

Kio kaj kiel

En la serio „Was und Wie“ („Kio kaj kiel“), propaganda broŝura serio eldonata de la Centra Komitato de Socialisma Unuiĝinta Partio de Germanio (SUPG), n-ro 10/78 aperis artikolo pri agado de Kulturligo de GDR. En tiu artikolo ankaŭ estas menciita Esperanto (p. 23).

La simpla esperantisto

La klarigoj de dipl. pedagogo Göpel, kiu prezentas siajn argumentojn en „d. e." 6/78 por publika diskuto, estas malmulte ĝustaj laŭ mia opinio. Lia kritiko pri nia centra informilo „der esperantist" estas malĝusta. Estus dezirinde, se ankaŭ aliaj abonantoj dirus sian opinion.
Historia (retrospektiva) rigardo pruvas, ke la nivelo de la kajeroj tre forte kreskis. Komence ĝi estis tre taŭga por komencantoj, hodiaŭ ĝi sufiĉas por altaj kaj pli altaj pretendoj. Kara amiko, ne ekzistas simplj esperantistoj, ekzistas nur komencantoj, progresintoj kaj perfektaj esperantistoj. Precipe pere de legado de nia organo plialtiĝas la nivelo de la abonantoj. Krome ili estas informitaj pri la aktualaĵoj. Ĉar ni devas konkuri kun la eksterlando, ni bezonas altan nivelon. Kaj kie ekzistas tiel malmultekostaj kajeroj?
Kara amiko! „Ĉiutaga lingva uzado"! Ankaŭ tion vi trovas en „d. e." precipe pere de l'informado pri la ĉiutagaj resp. okazaj aranĝoj en GDR. Ĉiu raportanto povas publikigi pri kio la esperantistoj interesĝas.

Nun pri via koncepto pri ekzamena sistemo post kursoj en la lingvo Esperanto. Viaj postuloj havas mian konsenton. Sed oni devas modifi. Grandurboj kiel Berlin, Leipzig k. t. p. ne bezonas la distriktan laborrondon. Certe la urbaj laborrondoj estas kapablaj formi ekzamenan komisionon por la unua ŝtupo (komencantoj). Sed viaj postuloj por komencintoj estas laŭ mia opinio tro altaj kaj pereigos la nombron de kandidatoj. Flue kaj korekte paroli Esperanton scipovas nur lingvo-talentuloj. Ankaŭ por la memgelernintoj estas deziratai la atestoj.

Mi esperas, ke la koncepto estos korektata.

Oskar Stolberg

Artikolo pri planlingvoj

Jam la 5a artikolo pri planlingvoj aperis en la gvida lingvistika revuo de GDR „Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung", eldonata de Akademie-Verlag (Berlin, GDR). En n-ro 6/78 (p. 595 — 599) doc. d-ro Otto Troebes de la universitato Halle publikigis studon pri la temo „Socia komunika bezono kaj teorioj pri la mondaj helplingvoj".
La artikolo ĝenerale estas favora sed aplikas iom nekutiman klasifikon.

An unsere Leser!

Die Redaktion hat ständig Interesse an interessanten Erlebnisberichten über Ihre Teilnahme an internationalen Veranstaltungen im sozialistischen Ausland. Schreiben Sie uns!

Welche Esperantistin

schreibt, gegen Honorar, Esperanto-Vorträge von Tonbändern ab? Gute Sprachkenntnisse, eine eigene Schreibmaschine und möglichst ein Tonbandgerät sind Bedingung. Meldungen erbittet der Zentrale Arbeitskreis Esperanto.

Tonbänder

Haben Sie interessante Vorträge in Esperanto in Ihrer Tonbandsammlung? Informieren Sie den Zentralen Arbeitskreis Esperanto! Vielleicht könnten Sie zur Bereicherung des Tonbandarchivs beitragen.

KORESPONDDEZIROJ 31635

Bulgario

D-ro Nikola Donev, **Sofio 1113,** str. Anri Barbjus 22, 64j., kuracisto, dez. kor. pri kuracaj plantoj, medikamentoj

ČSSR

20j. laboristo dez. kor. pri muziko: Tibor Andreas, **04012 Košice,** Irkutska 5

Finnlando

28jara inĝeniero de geodezio dez. kor. pri lingvoj, filmoj, turismo, kol. bk: Raimo Ruisko, Aarnintie 7 D 29, **95420 Tornio 2**

GDR

66jara iama ekonomisto dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. pm: Hans Schulze, **DDR-37 Wernigerode,** Karlstr. 10

Eveline Brandt, **3241 Walbeck,** Schlagbaum 52f, (27j.) dez. kor. tutmonde pri turismo, folkloro, kol. bk.

16j. lernanto dez. kor. pri martrafiko, literaturo: Ingolf Eckert, **301 Magdeburg,** Maxim-Gorki-Str. 20

Hungario

Instruisto, 26j., dez. kor. pri sociaj, politikaj kaj kulturaj temoj, interŝanĝi librojn: Bertók Zoltán, **Várpalota,** Kremnica 1, H-8100

Pollando

Komencantino, 23j., dez. kor. pri turismo, muziko, ekskursoj, lingvoj: Elzbieta Adamiec, **10-449 Olsztyn,** str. Zwyciestwa 69/81

Komencanto dez. kor. kun geamikoj el GDR: Jan Zyla, ul. Lèsnaz, **42-425 Kroczyce,** woj. Czestochowkie

Pawel Paruzel, ul. Swierczewskiego 35, **42-680 Strzybnica,** (24j) dez. kor. tutmonde pri muziko, turismo, vivo de junularo, religioj

Oficisto, 40j., dez. kor. pri muziko, literaturo k. a.: Mieczyslaw Nowak, **56-512 Bukowina** Syc. 9

24j. instruistino dez. kor.: Iwana Subicke, **80-360 Gdansk-Oliwa,** ul. Krzywanatego 39/2

Soveta Unio

19jara studento dez. kor. kun germanoj pri muziko, lingvoj, literaturo, turismo: Tónu Hirsik, **SU-202615 Estonio Värska**

22jara fraŭlo, sportisto, dez. kor. tutmonde p. ĉ. t. pri moderna muziko, literaturo, kol. pm. bk, diskojn: Viktor Tahtanlov, str. Komsomolskaja 53, **Primorsko-Ahtarsk,** Krasnodarskogo kraja

23jara studento de radiotekniko, E-kursgvidanto, dez. kor. kun GDR-anoj p. ĉ. t.: Vjaĉeslav Barzdunov, **630079 Novosibirsk-79,** ul. Nemiroviča-Dančenko 14, kv. 49

Inĝeniero dez. kor. pri lingvo, literaturo, arto, scienco, filozofio: Mikaelo Korotkov, Kenerovskaja obl. Leninck-Kiznesckii-3, **Arzarskaja 43**

Oficistino dez. kor. tutmonde, kol. pm, bk: Anfisa Ponomarjova, Severnaja 489 kv. 49, **350038 Krasnodar**

Grupo de komencantoj (20 geknaboj 16—19j.) dez. kor. tutmonde: Litovio, **Panevezys,** Hidromeloracia Teknikumo, Esperanto-kursoj, T. Lukoŝevičius

13—14jaraj knabinoj dez. kor. tutmonde kun samaĝuloj. Bv. skribi al: Esperantista Rondeto, **Surgut-1,** Tjumenskaja obl., sr. ŝkola n 4

Gelernantoj, 12—17j., dez. kor. tutmonde, kol. pm, bk, insignojn: Palaco de pioniroj, **332440 Berdjansk**

Andrej Popov, **332440 Berdjansk,** Melitpolska 4—12, (15j.) dez. kor. tutmonde, kol. pm, bk, kalendarojn

Anoj de Klubo de Internacia Amikeco en Universitato Gorjkij komencis lerni Esperanton k. dez. kor. tutmonde. Bv. skribi al la kursgvidanto: V. P. Beŝkarev, **603137 Gorjkij,** prosp. Gagarina, 222, kv. 95

Herausgeber: Kulturbund der DDR
(Zentraler Arbeitskreis Esperanto)
Redaktion: 108 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. – Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. – Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckwerkstätte Glauchau
Artikel-Nr. (EDV) 7928 III-12-8 564